

## **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2020-07-15 ĝis 2020-10-15

### **Eventoj**

Ene de tiu trimonata periodo, pri kiu ni raportas hodiaŭ, la lumtura evento tutcerte estis VEKI, la Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI. Kun 350 partoprenantoj ĝi estis la plej vasta evento de la Ligo. Dum 7 tagoj abundis la prelegoj, debatoj, prezentoj kaj koncertoj dum 12 horoj ĉiun tagon. Interŝanĝo de ideoj, anoncoj, informoj, diskutoj alportis diversajn fruktojn. Pri ili bonvole legu sube.

La Estraro kunvenis la 14-an de septembro per skajpo por labori.

### **Fruktoj de VEKI**

#### **Nova servo por praktiki interŝanĝojn de instruistoj kaj prelegantoj**

De la komenco de la pandemio niaj iranaj samideanoj abunde agadis sur la Reto uzante zoom-kanalon por si mem kaj por aliaj Esperanto-uzantoj. Tiel kreigis densa kunlaboro inter Ahmad Reza Mamduhi kaj Mireille Grosjean. Okaze de VEKI Ahmad lanĉis la ideon de servo simila al *eventaservo*, sed por proponi kontribuon de preleganto kaj/aŭ de instruisto. La prezidanto esploris por krei jenajn servojn: instruservon kaj prelegservon. Ŝi rilatis kun la homoj de *eventaservo*, Yves Nevelsteen kaj Fernando Shayani. Kaj jen, en kelkaj semajnoj, ili kreis tiun novan eblon. Bonvole vizitu [www.eventaservo.org](http://www.eventaservo.org) kaj rigardu dekstre supre, ĵus sub la titollinio, vi trovos la novan oferton.

#### **Riĉigo de la enhavo de la youtube-kanalo de ILEI : Esperanto+ Edukado ILEI**

Ekde aŭgusto la firmao E@I nutras la kanalon aldonante po unu prelegon ĉiun tagon. La « nutrado » daŭros ĝis novembro. Venas reagoj, venas komentoj, la dialogo plu iras. Iru rigardi ! <https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/videos>

### **Venontaj kongresoj**

#### **2021 : Edinburgo, Skotlando, Britio. 2022 : Kebekurbo, Kebekio, Kanado.**

Pro la sukceso de VEKI kaj la partopreno en ĝi de multaj membroj kaj ne membroj el la tuta mondo, la virtualeco de nia ĉiujara ĉefa kunveno devas daŭri. Pro tio ni pensas pri hibrida kongreso ekde 2021. Ni ne scias pri la stato de la mondo en julio 2021, neniuj scias. Ni ĉiuj esperas, ke ni povos iri al Edinburgo kaj vidi unu la aliajn, paroli kune, ridi kune, manĝi kune. Tamen la daŭra problemo pri financado de vojaĝo kaj akiro de vizo malebligas al multaj homoj alveni al nia kongresa urbo. Pro tio la Estraro decidis plu havi dissendadon de niaj kongresaj momentoj. Decido okazis, ke du personoj povos partopreni kun repago de kongreskotizo, manĝoj kaj tranoktoj, se ili povos zorgi pri disaŭdigo de niaj prelegoj kaj kunsidoj al la tuta mondo. Debatoj eblos kun instruistoj el foraj lokoj.

Unika estos la organizanto de nia Kongreso en Edinburgo. LKK estis kunmetita. La laboro fluas.

### **La Estraro**

Ĝi kunsidis en septembro. Decido okazis, ke Unika zorgos pri nia Kongreso 2021 en Edinburgo, Skotlando, Britio.

**La prezidanto** sendis salutojn kaj/aŭ gratulojn al la Kongreso de UMEA, la medicinistoj, al la Kongreso de Korea Esperanto-Asocio, al la argentina Kongreso. Okaze de la forpaso de Zlatko Tilsjar la prezidanto povis sendi telegramon okaze de la funebra ceremonio. Fakto estas, ke la Komitato de ILEI elektis lin Honora Membro en julio 2020. Sekvis por li nomumado kiel Honora Membro de UEA.

### **Agado de Ivan E. Colling, vic-prezidanto de ILEI**

1) Ĉefa respondeculo pri la evento Tago por Esperanto kaj Interlingvistiko en Universitatoj, kiu okazis en la 28-a de Julio kadre de VEKI (Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI).

Organizantoj de la evento, respondecaj pri anonco de la evento, evento, ricevado kaj analizado de la resumoj de prelegoproponoj, preparado de la programo, ricevado de registritaj prelegoj, kontakto kun la administrantoj de la retejo, kun aliaj estraranoj de ILEI, difino de la normoj por prezentado de la artikoloj: Mireille Grosjean (ILEI), Ivan Eidt Colling (ILEI, UFPR, ĉefa respondeculo pri la evento), Luiz Fernando Dias Pita (UERJ), Marcionilo José de Vasconcelos Neto (UFPR), Renato Guedes Filho (UFPR), Rita Mara Netto de Moraes (CELIN/UFPR), Ricardo Potozky de Oliveira (UFPR). La evento estis registrita en UFPR, ligita al projekto Lingvoj en Dialogo (projekto de por-komunuma agado kunordigata de I.E. Colling).

Tasko plenumota: legado de la artikoloj por publikigo (M. Grosjean, I.E. Colling, L.F.D. Pita, R.M.N de Moraes).

Kvanto da partoprenantoj en la 28-a de Julio laŭ la horo (UTC) kaj nomo de la preleganto/grupo (la sumo indikas nur la partoprenantojn en tiu tago; poste la filmo restis – kaj restas – spektebla en la retejo kaj iom post iom estas disponigataj en la Jutub-kanalo de ILEI, <<https://www.youtube.com/c/esperantoedukadoilei>>).

03h (Vicente Manzano-Arrondo) ...	13;
04h (Grupo ILEI-ESF-UEA) .....	26;
05h (Nina Danylyuk) .....	30;
06h (Ilona Koutny) .....	54;
07h (Vicente Manzano-Arrondo) ...	56;
13h (So Jinsu) .....	81;
14h (Grupo ILEI-ESF-UEA) .....	80;
15h (Federico Gobbo) .....	77;
16h (Philippe Planchon) .....	51;
17h (Philippe Planchon) .....	64;
20h (Davide Astori) .....	41;
21h (Ivan Colling) .....	52.

2) Prelego dum la *Tago por Esperanto kaj Interlingvistiko en Universitatoj*, sub la titolo *Esperanto kaj Interlingvistiko en Federacia Universitato de Paranao, Brazilo: historio, atingoj kaj perspektivoj*.

3) Kun Mireille Grosjean kaj Jozefo Nemeth: podia diskuto pri *Internacia Pedagogia Revuo*.

4) Registro de la prelego de Byelongo Elisée Isheloke kaj, surbaze de tiu registraĵo kaj de dosiero sendita de D-ro Isheloke, kunmetado de la filmo *Invitado por kunlaboro kaj kreado de fakultato kaj por enkonduki Esperanton en Universitato Espero de Kongo (UEK)*.

5) Partopreno en komitatkunsidoj de UEA en Aŭgusto kaj Septembro, kiel anstataŭanto de la prezidantino Mireille Grosjean.

6) Kune kun Rita Mara Netto de Moraes: provlegado kaj kontrolado de la teksto de la kvara eldono de *Manlibro pri instruado de Esperanto*. La laboro fariĝas sub la kunordigado de D-ino Katalin Kováts. Jam estis enpaĝigitaj de José Roberto Tenorjo 283 paĝoj. La 10-an de Oktobro la provlegado atingis paĝon 139.

### **La Komitato**

Pro la fakto, ke ne estis kvorumo okaze de nia virtuala komitatkunsido dum VEKI, ni survojas al pluraj retaj voĉdonoj ĵus nun. En aŭgusto, kun numero 2020 02, okazis konfirmo de elekto de du novaj Honoraj Membroj, Zlatko Tisljar kaj Germain Pirlot. Sekvis la voĉdono 2020 03 pri akcepto de nova konsisto de la Elekta Komisiono. Grava paŝo, ĉar 2021 estos elektoĵaro por la Estraro. La nun laboranta Elekta Komisiono konsistas el tri Komitatoj : Aurora Bute (gvid.) Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho. Survojas nun la voĉdono 2020 04, kiu rilatas al aprobo de jarraporto kaj financraporto pri la jaro 2019, kaj voĉdono 2020 05 pri eventuala altigo de kotizoj por sanigi niajn financojn.

### **Ekzamenoj**

#### **La Internaciaj Ekzamenoj de ILEI / UEA**

Ili plu ekzistas kaj plu utilas. Kompreneble en Eŭropo homoj preferas akiri KER-atestilon pro la fakto, ke tiuj KER-atestiloj estas ŝtate agnoskitaj. La ekzamenoj de ILEI / UEA estas movade agnoskitaj. La lasta sesio okazis en Burundo fine de 2019.

#### **Novtipa ekzameno de ILEI : KoMo**

Laborgrupo devus kreiĝi por krei tiun novan ekzamenon, kiu kompletigus la KER-ekzamenon. La celo estas ekzameni la Kulturajn kaj Movadajn konojn, pro tio la nomo KoMo. Ni tre esperas, ke **Karine Arakeljan**, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) konsentos membri en ĝi. Du aliaj personoj montris intereson : la ILEI-vicprezidanto **Ivan Colling** kaj **Pawel Fischer-Kotowski**, kiu studis kun Ivan kaj Mirejo en Poznan. Mireille Grosjean kompreneble partoprenos, tio estas, ke la laborgrupo havos 4 membrojn.

### **Kursoj**

#### **La kungfua kuniklito**

Nia kolegino Alessandra Madella informis la prezidanton pri tiu projekto. La celo de tiu projekto estas edukado de infanoj al harmonia kunvivado kaj respekto de la Planedo. La rimedoj por tia edukado estos animaciaj filmetoj kaj libroj. Jam laboras du aŭtoroj en Ĉinio, kadre de internacia skipo. La celoj bone kongruas kun la celoj de ILEI. La kunlaboro inter ILEI

kaj la aŭtoroj Sinjoro Massimiliano Garcia kaj Sinjoro Miguel Herberg, du fakuloj pri animaciaj filmoj, ne ankoraŭ estas klare difinita. Vidu du prezentajn filmetojn en la Youtube-kanalo de ILEI. <https://www.youtube.com/watch?v=n2zCHse8iQg>

### **Problemo pri parto de la Multlingva Akcelilo (MLA)**

Averto atingis la prezidanton la 25-an de septembro. « Atentu ! Stereotipoj aperas en la enhavo kaj eraro kaj malglataĵoj aperas en la franclingva versio. » Mireille Grosjean ricevis kopiojn de plenaj paĝoj kaj povis konvinkiĝi, ke diskonigo de stereotipoj ne eblas, kiam ILEI kaj UEA ceta kunlabori kun ekzemple UNESKO. Do ŝi petis ĉesigon de la diskonigo kaj povis ĝisfunde esplori la enhavon kaj lingvan formon de la kurso. Kunlabore kun kolego ŝi povis krei du dokumentojn, kiuj analizas la situacion kaj proponas solvojn. Unu rilatas al la enhavo, la alia pri la lingva aspekto. Tiuj du dokumentoj iris al kelkaj respondeculoj kaj interesatoj pri tiu MLA. Ni tre esperas, ke la kelkaj plibonigoj povos okazi en la diverslingvaj versioj, por ke tiu bonega kurso povu ĝui disvastigon en la venontaj monatoj. Volonte ILEI kontribuos al tio.

### **Eldonado**

La **Manlibro pri Instruado de Esperanto**, giganta laboro en la manoj de D-ino Katalin Kovats, atingas sian maturan stadion. Ĝi entenas 370 paĝojn kaj prezentos aktualajn instrueblojn kaj novajn analizojn. La eldonantoj estos ILEI, E@I kaj Edukado.net. Baldaŭ eblus antaŭmendi ĝin: sekvu la anoncojn sur la retejo de ILEI [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

Plie ILEI provas atingi finan presstadion por la **Manlibro por lerni Esperanton en la SUAĤILA**. Ni atendas la verdan lumon de la aŭtoro Nino Vessella.

### **Internacia Pedagogia Revuo (IPR)**

Daŭre ni zorgas pri bunta enhavo riĉiga por ne nur instruistoj.

### **Juna Amiko (JA)**

Daŭre venas kontribuoj el diversaj mondopartoj por nutri la scivolemon de la lernemuloj.

### **Kontaktoj kun UEA kaj enmovadaj institucioj**

ILEI partoprenis diversmaniere en la trimonata Monda Festivalo de UEA kaj tre konkrete dum la Virtuala Kongreso komence de aŭgusto. Okazis la tradicia Tago de Lernado, organizita de Marija Belosevic nome de ILEI.

Fluas bonaj kontaktoj kun TEJO, UMEA kaj aliaj organizoj.

### **Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

La vic-prezidanto Ivan Colling. La prezidanto Mireille Grosjean